

FONTO DE AKVO ŜPRUCANTA POR ETERNA VIVO – Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Johano 4, 5-42

En tiu tempo Jesuo iris al Samaria urbo, nomata Siĥar, apud la terpeco, kiun Jakob donis al sia filo Jozef. Tie estis la puto de Jakob. Lacigita pro la vojirado, Jesuo sidiĝis apud la puto. Estis ĉirkaŭ tagmezo. Liaj disĉiploj jam foriris en la urbon por aĉeti nutraĵojn. Samaria virino venis por ĉerpi akvon. Jesuo diris al ŝi: «Donu al Mi trinki». La virino respondis: «Kial Vi, kiu venas el Judeo, petas trinki de mi, kiu estas Samaritanino?». La Judoj ne havas bonajn interrilatojn kun la Samaritanoj.

Jesuo respondis al ŝi: «Vi ne scias, kiu estas tiu, kiu petas de vi por trinki; kaj vi ne scias, kion Dio povus doni al vi pere de Li. Se vi scius tion, vi mem petus Lin, kaj Li donus al vi vivan akvon». La virino rimarkis: «Sinjoro, Vi nenian ĉerpilon havas, kaj la puto estas profunda. De kie do Vi prenas tiun vivan akvon? Ĉu Vi estas pli granda ol nia patro Jakob, kiu trinkis mem el ĝi, kiel ankaŭ liaj filoj kaj brutoj, kaj poste donis al ni la puton?».

Jesuo respondis al la virino: «Ĉiu, kiu trinkas el ĉi tiu akvo, denove soifos. Sed kiu trinkas el la akvo, kiun Mi donos al li, neniam plu soifos; kaj la akvo, kiun Mi donos al li, fariĝus en li fonto ŝprucanta por eterna vivo». La virino diris al Li: «Sinjoro, donu al mi ĉi tiun akvon; tiel mi ne plu soifos, kaj ne devos veni ĉi tien por ĉerpi». Jesuo diris al ŝi: «Iru, voku vian edzon kaj revenu ĉi tien». Respondis la virino: «Mi ne havas edzon». Jesuo diris: «Prave vi diris: Mi ne havas edzon; ĉar vi havis kvin edzojn, kaj tiu, kiun vi nun havas, ne estas via edzo».

La virino ekkriis: «Sinjoro, mi vidas, ke Vi estas profeto! Niaj patroj, la Samaritanoj, adoradis Dion sur ĉi tiu monto; kaj vi en Judeo

diras ke la nura loko por adori Dion estas Jerusalemo». Jesuo diris al ŝi: «Vi Samarianoj adoras Dion ne konante Lin; ni en Judeo adoras kaj konas Lin, ĉar Dio savas la homojn komencante de nia popolo. Sed kreu al Mi, venas la tempo, kiam adoro al Dio ne plu estos ligita al ĉi tiu monto, aŭ al Jerusalemo. Venas tempo, eĉ, ĝi jam venis, kiam la homoj adoras la Patron en la Spirito kaj vero. Dio estas spirito kaj kiu adoras Lin devas esti gvidata de la Spirito kaj de vero». La virino respondis: «Mi scias, ke venos la Mesio, nome, Kristo. Kiam Li ĉeestos, Li instruos nin pri la tuta vero». Jesuo diris: «Mi estas la Mesio, Mi, kiu parolas al vi».

Tiumomente alvenis liaj disĉiploj. Ili miris, vidante ke Li parolas kun virino. Tamen neniu demandis: «Kion Vi volas de ŝi?», aŭ: «Kial Vi parolas kun ŝi?». Dume, la virino, lasante sian akvokruĉon, foriris en la urbon kaj diris al ĉiuj: «Venu kaj vidu la homon, kiu diris al mi ĉion, kion mi faris. Ĉu eble Li estas la Mesio?». Tiam ili eliris el la urbo kaj sin direktis al Li. Dume la disĉiploj petis Lin, dirante: «Rabeno, manĝu». Sed Li respondis: «Mi havas nutraĵon, kiun vi ne konas».

La disĉiploj diris inter si: «Ĉu iu alportis ion por manĝi?». Sed Jesuo diris al ili: «Mia nutraĵo estas plenumi la volon de tiu, kiu Min sendis, kaj efektiviĝi lian ordonon. Estas proverbo inter vi, kiu diras: "Ankoraŭ kvar monatoj kaj poste oni rikoltos". Sed Mi diras al vi: Levu viajn okulojn kaj rigardu la kampojn, ke ili jam estas blankaj, pretaj por la rikolto. La rikoltanto jam ricevas pagon kaj kolektas frukton por la eterna vivo, tiel ke la semanto ĝojas kun la rikoltanto. Tie ĉi alia proverbo pravas: "Unu semas kaj alia rikoltas". Mi vin sendis por rikolti, kion vi ne prilaboris; aliaj laboris, kaj vi rikoltas la frukton de ilia laboro».

Dume la Samarianino rakontis al ĉiuj, ke Jesuo kapablis diri al ŝi ĉion, kion ŝi faris. Pro tio multaj Samarianoj el tiu urbo kredis je Jesuo. Kiam do ili venis al Jesuo petante, ke Li restu ĉe ili, Li restis tie du tagojn. Kaj kiam ili aŭskultis liajn vortojn, multe pli da homoj kredis. Kaj al la virino ili diris: «Ni kredas jam ne dank' al via rakonto, sed per propraj oreloj ni aŭdis, kaj ni estas konvinkitaj, ke Li vere estas la Savanto de la mondo.»

Estas tri la inaj rolantoj en la evangelio de Johano, al kiuj Jesuo sin adresas per la nomo "virino", kiu signifas "novedzino, edzino", kaj ili reprezentas iele la novedzinojn de Dio. La rilato inter Dio kaj lia popolo, pere de la profetoj, specife ekde Osea posten, la profeto de Samario, estis bildigita kiel tiu de geedziĝo. Dio estis la novedzo kaj la popolo lia novedzino.

Nu, en tiu ĉi evangelio Jesuo sin adresas, ŝin vokante "virino", tio estas "novedzino", al la patrino dum la geedziĝo en Kanao, la patrino reprezentas la popolon kiu ĉiam estis fidela al Dio, atestanto de la nova interligo kiun Jesuo venos proponi, ĉar en tiu malnova ne estas vino, nome mankas la amo.

Poste Jesuo, en la peco kiun ni nun vidas, sin adresas per la sama nomo "virino", edzino, al la adulta virino, la adulta edzino, kiun la edzo iras rekonkeri ne per minacoj aŭ punoj, sed per eĉ pli granda amfero. Fine, la tria kaj lasta ina rolanto al kiu Jesuo sin adresos ŝin nomante "virino" estas Maria el Magdala kiu reprezentas la novan komunumon, la novedzinon de la Sinjoro.

En tiu ĉi peco enestas la intenco de Dio, kiu estas Jesuo, rekonkeri la adultan edzinon. Jen kial en la versiklo kiun bedaŭrinde la liturgio eliminis de tiu ĉi legaĵo (versikloj 3 kaj 4) oni legas ke "*Jesuo lasis Judeon kaj sin direktis ree al Galileo*" kaj, skribas la evangeliisto "*li devis pro tio trairi Samarion*".

Tiu "li devis trairi Samarion", ne ŝuldiĝas al geografia itinero. Kutime de Judeo al Galileo oni trairis la pli komfortan kaj trankvilan valon de Jordano-rivero, ĉar, pro tio ke estas malamikeco inter galileanoj, judoj kaj samarianoj, trairi tiun regionon signifis iri renkonte al problemoj. Kaj ofte oni perdis propran felon. Do tiu "devis" flanke de Jesuo "trairi Samarion", ne ŝuldiĝas al itineraj, sed al teologiaj kialoj.

Temas pri la edzo kiu iras rekonkeri la adultan edzinon. La evangeliisto prezentas al ni samarian virinon, anoniman. Kiam la rolantoj estas anonimaj, tio signifas ke ili estas reprezentantoj de iu realo kiun la evangeliisto volas prezenti. Kaj Jesuo, indiferenta al konfliktoj pri raso, religio kaj sekso, sin adresas al tiu virino petante de ŝi trinki. Estas afero kiun juda viro neniam estus farinta, peti de virino, des pli samaria, malamika, kiu estas konsiderata malpura.

Fakte la samaria virino miras kaj demandas al Jesuo: «*„Kial Vi, kiu venas el Judeo, petas trinki de mi, kiu estas Samarianino?“*», kaj ŝi tion substrekas, viro neniam alparolas virinon, kaj krome tiu estas samaria. La samarianoj, pro sia idolkulto, kiun ni nun vidus, estis konsiderataj malpuraj, malamikoj de Dio kaj malamikoj de ĉiuj homoj. Kaj la evangeliisto diplomatie substrekas *“La Judoj ne havas bonajn interrilatojn kun la Samarianoj”*, tio estas ili interŝanĝadis amason da batoj, ĉiun fojon kiam ili renkontiĝis.

Bone, Jesuo petis minimuman akceptosignon, gastosignon, por poste respondi per sia donaco. Kaj *“Jesuo respondis al ŝi: vi ne scias, kion Dio povus doni al vi”*. La edzo iras rekonkeri la adultan edzinon, ne pere de minacoj, sed per eĉ pli granda amofero. Kaj diras Jesuo *“Se vi scius tion, vi mem petus Lin, kaj Li donus al vi vivan akvon”*, nome akvo de la fonto.

Kaj jen je tiu punkto la dialogo disvolviĝas inter du malsamaj terminoj kiuj rilatas la lokon de tiu ĉi akvo. Estas bedaŭrinde ke la tradukistoj ne konsideru tion. Dum la virino parolas pri puto, kiu signifas la lokon kie estas akvo, sed la akvo ne estas viva kaj, precipe, postulas la streĉon de homo, en tiu ĉi kazo de la virino, por ĉerpi akvon.

La puto estas la bildo de la leĝo kaj la akvo estas tio kio donas la vivon. Dum la virino parolas pri puto, tio estas ŝi ne konas nepagendan donacon, Jesuo parolas al ŝi pri fonto. En la fonto la akvo estas viva, la akvo ŝprucas, kaj precipe ne postulas ajnan streĉon flanke de la virino kiu soifas, krom tiu trinki. Fakte Jesuo respondas al ŝi: *„Ĉiu, kiu trinkas el ĉi tiu akvo, denove soifos.”*, bildo pri la leĝo. Le leĝo ne sukcesas respondi al deziro kiun ĉiu homo enhavas en si mem.

Ĉar, por la leĝo, la homo estas ĉiam limigita, neadekvata, neplenumanta. Sed Jesuo deklaras. *“Kiu trinkas el la akvo, kiun Mi donos al li, neniam plu soifos;”*. Lia mesaĝo, lia persono, estas la respondo de Dio al deziro je pleneco kiun ĉiu persono enhavas en si mem. Kaj, aldonas Jesuo: *“kaj la akvo, kiun Mi donos al li, fariĝus en li ...”* ne plu temas do pri ekstera akvo, sed pri interna akvo *“...fonto ŝprucanta por eterna vivo.”* La amo de Dio, kiu pere de Jesuo estas komunikata al la homo, tiom kiom la homo ĝin akceptas kaj transdonas al la aliaj, en tiu ĉi dinamismo de amo ricevita kaj amo komunikata, realigas, kreskigas kaj maturigas sian ekziston porĉiame. Tio igas la vivon nedetruibla.

Ne temas do pri sperto pri observado de leĝo ekstera al la homo, sed pri sperto de iu interna forto, ĉar Dio ne regas la homojn promulgante leĝojn kiujn tiuj devas observi, sed komunikante al ili sian meman amkapablon. Je

tiu ĉi punkto, strange, Jesuo petas de la virino iri voki la edzon. La respondo de la virino estas ke ŝi ne havas edzon. Kaj Jesuo rimarkigas al ŝi ke ŝi havis kvin edzojn.

Kion tio signifas? Ni vidis ke la virino estas anonima, la anonimaj rolantoj estas reprezentaj, la virino do reprezentas Samarion, kaj kio estas tiuj kvin edzoj? Tiu regiono estas loĝata de kampuloj venantaj de aliaj landoj kiuj portis siajn diaĵojn. Pro kio sur kvin montoj estis kvin temploj al kvin diaĵoj. Krome, sur monto Garizim, la templo al Jahveo.

Ili do adoris Jahveon, sed kune kun aliaj diaĵoj. Kaj, en la hebrea lingvo, "sinjoro", kaj "edzo" havas la saman signifon. La virino komprenas. Ŝi komprenas ke tiu kiun ŝi vokis Sinjoro, estas nun profeto, kaj referencas al tradicio. *"Niaj patroj, la Samarianoj, adoradis Dion sur ĉi tiu monto; kaj vi en Judeo diras ke la nura loko por adori Dion estas Jerusalemo"*, Ŝi komprenis la vokon de Jesuo kaj pretas reveni al la vera Dio.

Ŝi nur volas scii kie. Estas pluraj sanktejoj, precipe tiu grava de Garizim, kie oni adoras la Dion de Izraelo, sed estas ankaŭ tiu en Jerusalemo. Ŝi do pretas reveni al Dio, sed ŝi volas scii kie. Jen la grava novaĵo kiun Jesuo eldiras al tiu samaria virino, la finon de la templo, la finon de la kulto. *"Sed kedu al Mi, virino" li sin adresas al ŝi ŝin vokante "virino", edzino, "venas la tempo, kiam adoro al Dio ne plu estos ligita al ĉi tiu monto, aŭ al Jerusalemo"*.

Ŝi referencis al la prapatroj, "niaj prapatroj", Jesuo ŝin invitas akcepti la Patron, ŝi pensis iri ien por oferi al Dio, nun komenciĝis la epoko en kiu estas Dio kiu oferas sin al la homoj, kiu petas esti akceptata por pliigi ilian amkapablon kaj por igi ilin kapablaj je sindona kaj senkondiĉa amo kiel la sia. Jen la grava anonco de Jesuo: *"Venas tempo, eĉ, ĝi jam venis, kiam la homoj adoras la Patron en la Spirito kaj vero"*.

Spirito kaj vero estas esprimo kiu indikas la fidelan amon. La ununura kulto kiun Dio petas ne ekas de la homoj al Dio, sed de la Patro al la homoj. Estas la komunikado de lia amo kiun la homo alproprigas al si, kaj la ununura kulto kiun Dio petas de li estas la daŭrigo de tiu amo. Spirito kaj vero signifas veran amon. Kiam la amo estas vera? Kiam la amo estas fidela. Fakte... kaj ĉi tie estas la traduko de CEI (Itala Episkopara Konferenco)... *"Fakte la Patro volas ke estu tiuj kiuj lin adoras"*. Pli taŭgas la originala teksto, en kiu la evangeliisto diras: *"Fakte la Patro serĉas tiajn adorantojn"*.

Tioma estas la urĝo de la Patro manifestiĝi al la homoj, ke la Patro ilin serĉas por realigi sian amprojekton. Kaj jen la belega eldiro de Jesuo: "*Dio estas spirito*", Spirito ne estas io abstrakta, sed ĝi signifas vivigan kreivan energion. "*Kaj kiu adoras Lin devas esti gvidata de la Spirito kaj de vero*", de la fidela amo. Dio do estas am-kreiva energio kiu postulas nur esti akceptata de la homo por plidaŭrigi sian amon por la tuta homaro. Tiu estas la novaĵo alportata de Jesuo. Ĝi estas la fino de la templo, ĉar ne plu necesas la templo, kaj la fino de la kulto, kiu estis malpliigo de la homo kompare kun Dio.

La homo devis forpreni de si ion por ĝin doni al Dio. En la nova kulto estas Dio kiu sin oferas al la homoj ĉar kun li kaj kiel li, ĉiuj sin donu al la tuta homaro.